n-ro 53

julio 1996

## Novaj membroj: atentu !

Personoj kiuj decidas nun aliĝi al IKEF, bonvolu pagi membrokotizon por 18 monatoj ĝis fino de 1997, t.e., laŭ la kategorio, 900 aŭ 600 belgaj frankoj (vidu p. 2).

## IKEF-identecŝildaro 1996-1997

Je paĝo 11 vi povas legi la informojn kaj la formularon. Ne forgesu !

## Nova IKEF-informilo

Aldone vi trovos kelkajn ekzemplerojn de la nova informilo.  Bonvolu uzi ilin por varbi kaj tiel plifortigi la grupon.  Pli da ekzempleroj estas haveblaj.

## Enhavo


Anoncitaj aranĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
Internacia tradukreto . . . . . . . . . . . . . . . . 4
Hanso-komercistoj en Brugge . . . . . . . . . . . . 5
Revizio de PIV . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 6
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . 9

**La Merkato** (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** estas dujara eldono por la membroj de IKEF. Ĝi ne estas aparte vendata.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**:

Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)knooppunt.be.

Atentu !

Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

---

**La jara membreca kotizo** estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD).

Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per **eŭroĉeko** (en belgaj frankoj, kun kartonumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT, kaj per internaciaj respondkuponoj (1 IRK = 34 belgaj frankoj).

**Perantoj**:

*Cinio*: S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an

*Francio*: S-ro François-Xavier **GILBERT**, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon
(CCP 1275-89 L Nancy)

*Germanio*: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

*Hungario*: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio*: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

*Japanio*: S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12;



retpoŝto study069(a)jpndokyo.dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

**Anoncitaj aranĝoj**

**Universala Kongreso en Prago**

* Seminario pri Lingvopolitiko de UEA okazos je sabato, 20 julio 1996. Interesitoj direktu sin al s-ro Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, D-12683 Berlin, Germanio, fakso +49-30-545-67-42.

* Faka forumo okazos je jaŭdo, 9.00-10.30 h. Ĝi estos podio por fakaj asocioj, kiuj tie povos prezenti atingojn, interŝanĝi informojn kaj spertojn, proponi novajn iniciatojn...

* IKEF-kunveno okazos je vendredo, 16.30-18.00 h., en salono Pumpr.

* Eble okazos vitizo al entrepreno aŭ komerca ĉambro; daŭras la negocado.

Ŝanhajo (Ĉinio), Universitato pri Internaciaj Studoj, 22-25 aŭgusto 1996: 1a Azia Kongreso. Subtemo i.a.: Azia ekonomio kaj la 21a jarcento. Informoj: Shanghai-a E-Asocio, 7-622 Hua Hai Zhong Lu, CN-200020 SHANGHAI, Ĉinio, fakso +86-21-63272894. Partoprenos IKEF-membroj Yamasaki Seikô, Wang Tianyi kaj Lee Teck Shiu.

Ferrara (Italio), 24-28 aŭgusto 1996: 65a Itala Kongreso de Esperanto. Temo: Internacia Komunikado en la mezaj kaj malgrandaj entreprenoj (pritraktota en loka komerca ĉambro je 26 aŭg., 10a-13a h. kaj je 27 aŭg., 10a-13a h.).
LKK: Edvige Ackermann, via Valerio 110, I-34128 TRIESTE, telefono kaj fakso 00-39-40-350093. Partoprenos IKEF-membroj Braun, Gilbert, Picasso kaj Polerani.

Samtempe okazos Esperanto-kurso por junaj internaciaj entreprenistoj, proponata de EKA - Esperanto Komerca Agado kaj favorata de lokaj institucioj. Pli da detaloj aliloke en ĉi tiu numero (p. 10).

Kozieglowy-Poznan (Pollando), 4-6 oktobro 1996: XII-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto. Teatraj spektakloj, renkontiĝoj kun verkistoj, E-filmoj, debatoj... Petu aliĝilon de Tadeusz CHROBAK, Esperancka Fundacja Kulturalna, Osiedle Lesne 16, PL-62-028 KOZIEBLOWY (ĉe



Poznan), tel. (0-61) 127-805.

**Novaĵoj de ITRE (Internacia Tradukreto pere de Esperanto)**

Alvenis kelkaj novaj tradukantoj:

- Bulgara: Dimitar TERZIEV, Milin Kamak 58, BG-1421 SOFIA
- Japana: Tutomu NISIO, Takadono 4-13-3, ASAHI-KU, J-135 OOSAA-SI
- Persa: M. Reza TORABI, P.O. Kesto 17765-184, TEHRANO
- Franca (pri medicino): D-ro Denis-Serge CLOPEAU, 6 rue J.P. Calloc'h, F-22000 ST-BRIEUC
- Itala: Roberto BIANCHI, Fernando de Rosa 5, I-40134 BOLOGNA

Pro diversaj kialoj forfalis: Wolfram Diestel, Jimmy Stryhn Meyer, Albu Vasile.

Kompletigaj informoj ĉe la kunordiganto: Daniel DURAND, "Les Nids", F-49190 ST-AUBIN-DE-LUIGNE.

**Pri la nova IKEF-informilo**

La nova informilo, aldonita al ĉi tiu numero de La Merkato, estas la lasta grava realigo en la kadro de nia "domstilo". Rilate al informado pri IKEF, restas kelkaj taskoj farendaj. Unu tia tasko estas prizorgo de IKEF-informoj en

TTT/WWW (Internet)

Ĉiu asocio kaj kompanio - ankaŭ esperanta - nuntempe havas t.n. "hejmpaĝon" en la Tuttera Teksaĵo (angle: Word Wide Web). Por IKEF tio utilus unuflanke por informi pri la grupo, aliflanke por pli rapide kaj pli vaste diskonigi la komercajn proponojn alvenintajn ĉe IKEF. Eblas "sublui" spacon de alia asocio; tio kostas proksimume 100 USD jare. Pli bone estas havi propran paĝon. Ofte al abono de Internet-servoj estas ligita ebleco sen plia kosto havi hejmpaĝon. Ĉu iu membro pretas disponigi sian paĝon al IKEF ? En ambaŭ kazoj estas bezonata persono kiu daŭre aktualigas la enhavon.

**Esperanto kiel marknomo**

Pekim Vaz (Caixa Postal 182, Belém - PA, BR-66017-970, Brazilo) serĉas por artikolo en brazila gazetaro vinojn, likvorojn, bierojn, viskiojn, parfumojn... kiuj portas la nomon "Esperanto". Bezonataj estas nomo kaj lando de la entrepreno.



**Hanso-komercistoj en Brugge en la 14a-15a jarcento**

"Hanso" estas ĝenerala nomo de grupiĝoj de komercistoj aŭ de komercaj urboj kiuj ekzistis en norda Eŭropo de la 12a ĝis la 17a jarcento. Se oni parolas pri Hanso plej ofte temas pri la Germana Hanso, kiu grupigis dekojn da urboj en nunaj Germanio kaj Pollando; unu el la ĉefa urboj estis Lübeck. Komercistoj el tiuj urboj regis, eĉ monopoligis, la interregionan komercon en norda Eŭropo kaj najbaraj regionoj. La ĉefaj Hanso-kontoroj troviĝis en urboj je la rando de la teritorio: Novgorod (Rusio), Bergen (Norvegio), London (Britio) kaj Brugge (Flandrio, nun Belgio).

Brugge troviĝis je la limo inter du influsferoj: la germana kaj la franca/latina. Germanaj komercistoj nur malofte vojaĝis pli suden ol Brugge aŭ London. Siaflanke ankaŭ Italoj kaj Hispanoj limigis siajn ekskursojn al tiuj urboj. (Rilatas al mara komerco; enlande estis similaj limurboj, ekzemple Krakau kaj Breslau en nuna Pollando.) Ĉar Brugge en tiu epoko kapablis akcepti marŝipojn, ĝi iĝis turnopunkto de la komerco inter norda kaj suda Eŭropo. Interalie pro tiu komerco, ĝi ankaŭ estis grava el ekonomia, politika kaj kultura vidpunkto.

La komercistoj delegitaj de la hanso-urboj ne rajtis rekte komerci en Brugge. Por ĉiu transakcio estis deviga la interveno de loka makleristo. Ankaŭ por sia loĝigo kaj por la dumtempa staplado de la aĉetitaj kaj vendotaj varoj ili bezonis lokan partneron: intervenis por tio la gastejestroj. En tria loko - malpli grave, ĉar la hansanoj kutimis mem prizorigi siajn financojn - helpis la monŝanĝistoj.

Makleristoj, monŝanĝistoj kaj gastejestroj estis nemalhaveblaj kaj sukcesis akiri pli ol proporcian enfluon en la urba registaro. Ofte tio estis kaŭzo de konfliktoj. Ja estis neeviteble ke foje ili devis decidi pri hansanoj, kiuj samtempe estis iliaj klientoj. Ekzemplo de ilia influo sur la komerco estas loka tradicio (pri kiu bonvenus konfirmo el alia mondparto), laŭ kiu la vorto "borso" (komercejo) devenas de la nomo de iu tiutempa hotelestro "Van der Beurse".

Ankaŭ hispanaj urboj havis komercajn reprezentejojn en Brugge. Kontraŭe, reprezentantoj de Italaj urboj rolis kiel bankistoj. Ĉefa kialo estis la eklezio. La episkopejoj kaj monaĥejoj en tuta Eŭropo devis pagi kontribuojn al la papo en Romo. Ĉar estis nekonvene kaj danĝere transporti oron kaj aliajn valoraĵojn longdistance, italoj kreis ĝiran pagsistemon, antaŭanton de la nuna banka sistemo. Tio multe favoris komercajn kaj financajn transakciojn inter suda kaj norda Eŭropo. Tamen, pluraj italaj bankistoj bankrotis pro pruntedono de grandegaj sumoj al potenculoj por financi ties militojn.

La teksto sur la antaŭa paĝo estas resumo de prelegoj dum kolokvo pri Hanso-komercistoj kiu okazis en Brugge je 25-28 aprilo 1996. Grava stimulanto de la studado de la Hansoj estis Prof. Paravicini, nun estro de la Germana Historia Instituto en Paris, Francio. Kontakta-dreso: Prof. H. Wernicke, Universität, Domstr. 9a, D-17487 Greifswald, Germanio (fakso 03834-863305). Ĉefa laborlingvo de la Hanso-studoj estas la germana. Oni intencas eldoni la tekstojn de la prelegoj, sed momente ankoraŭ mankas detaloj pri tio.

RR

**Revizio de Plena Ilustrita Vortaro**

Por la revizio de PIV, ni petas ke vi sendu viajn rimarkojn pri la jena temo:

Ĉu la nomoj de urboj, regionoj, gentoj kaj similaj informoj, menciitaj en PIV kaj rilatantaj al via kutima loĝ-loko, ŝajnas al vi ĝustaj ?

Se ne, bonvolu sciigi viajn argumentojn kaj proponojn al:

Michel Duc Goninaz, Val St-Geoges, Chemin de l'Echelle, F-13100 AIX-EN-PROVENCE, Francio

aŭ

SAT, 67, av. Gambetta, F-75020 PARIS,
Telefono + 33.1.47.97.87.05 - fakso +33.1.47.97.71.90,
retpoŝto: sat-esp(a)worldnet.net;
TTT: http://www.worldnet.net/~sat-esp/

Kreŝimir Barkoviĉ, ĝenerala sekretario



se vi vojaĝas en Ĉinio, ne forgesu vian

**Verda Reto 1996**

**listo de ĉinaj esperantistaj aktivaj kaj kontaktemaj**

Kompletaj informoj dulingve: nomo, aĝo, profesio, sekso, adreso, telefono, telefakso, kaj televoko, kun tuilaj gvoj por kontakti ĉinajn esperantistojn. Kompilis Solis (Liu Xiaozhe). 60 p. Prezo 3 USD (inkl. sendkoston).

Mendu ĉe: s-ro Wang Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 Hao, CN-710054 XI'AN. Fakso +86 29 7218042

**Recenzo**

Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj. Petr Chrdle. Dobřichovice: KAVA-PECH, 1995. 40 p. 20 cm. 3,90 NLG.

En prelego dum kolokvo de la Akademio pri "La stato kaj estonteco de Esperanto" (Prago, 1994), kiujn li nun eldonis en plaĉa broŝuro, la aŭtoro priskribis proprajn spertojn, en sistema kadro, pri du ekonomiaj branĉoj kiuj estas pli facile alireblaj por komercantaj esperantistoj: eldonado kaj turismo. Chrdle ne prezentas teoriojn, sed montras la merkatan praktikon. Tial lia libreto enhavas valorajn konsilojn. La praktikema Chrdle ne predikas belajn esperojn, sed ankriĝas en la realo, eĉ kiam tio sonas malagrable en esperantistaj oreloj. Kompreneble Esperanto alportas jurajn problemojn se ĝi estas la lingvo de negoca kontrakto: kiu tribunalo postekzamenos ĝiajn klaŭzojn ? Pli bone lerni ĉe Chrdle kiel preteriri tiujn malfacilaĵojn ol poste suferi malavantaĝojn. La maldika libreto ne povas vaste priskribi sian temon. Estas necese akumuli pli da spertoj pri komercado per Esperanto. Bonvena estas la kontribuaĵo de Chrdle, prilumanta interesajn facetojn, al tiu ampleksa temo.

D-ro Werner Bormann
(transprenita el revuo ESPERANTO, majo 1996)

**Komerca Terminaro "Key words" : la lastaj ekzempleroj !**

De la Esperanto-versio de Key words (plurlingva terminaro de la

Internacia Komerca Ĉambro) restas nur kelkdekaj ekzempleroj. Rapide mendu ekzempleron ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Prezo: 450 BEF (aŭ egalvaloro: 22 DEM, 14 USD) + afranko. Ankaŭ eblas rezervi ekzempleron ĉe FEL aŭ ĉe Roland Rotsaert por transdono kaj pago dum UK.

**Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio**

IPTEA serĉas kontaktojn kun gekolegoj en la sfero de PTT, radio kaj televido de la tuta mondo. IPTEA eldonas fakrevuon "INTERLIGILO". Adreso: poŝtenska kutija 25, BU-1000 SOFIA, Bulgario.

el EREJO-Bulteno



**Antaŭanto de La Merkato: La Komerco**

De 1929 ĝis 1936 "Komercista Esperanto-Unio" (KEU) eldonis revuon "KEU-Informilo (1927-29, 20 numeroj) kaj "La Komerco" (1929-36, 23 numeroj). En numero 21 (decembro 1934) estis menciita la eldonkvanto: 13.000, cifero pri kiu nuna Esperanto-revuoj nur povas revi. Ĝi ne plu aperis post 1996; eble estas rilato kun la translokiĝo de alia revuo, Heroldo de Esperanto (almenaŭ dumtempe presisto de La Komerco), kiu en la tridekaj jaroj translokiĝis de Germanio al Belgio ?

Oficejo de KEU troviĝis en Dresden/Radebeul (Germanio), Friedrich-Auguststr. 4. Ĝi havis perantojn en pluraj landoj kaj aktivis en komerco per perado. Ŝajne estis bonaj kontaktoj kun la Komerca Ĉambro de Dresden.

Mi hazarde trovis kelkajn numerojn de ĉi tiu revuo dum ordiga laboro en la E-biblioteko de Kortrijk. Aldonajn informojn liveris Hispana Esperanto-Muzeo. Estus utile esplori la historion de KEU; IKEF ja povus lerni el ĝi.

RR

**Instruistoj-kuiristoj serĉataj**

Tomska Komerca Kolegio deziras krei komunajn entreprenojn de amasnutrado kaj serĉas kompetentajn instruistojn kiuj povas instrui kuiradon kaj servadon de diversnaciaj pladoj. Informoj: V. Minin, vicdirektoro, a.ja. 2000, RUS-634063 TOMSK, Rusio, telefono/fakso +7-3822-756453.

**Al Merkatesploro - korektoj**

Aldone al numero 51 de La Merkato, la membroj ricevis broŝureton "Al Merkatesploro". Je paĝo 8, sube, forfalis parto de la teksto.
Bonvolu kompletigi sub 4.2.3.:
- Perantoj... prognozu la <u>mendadon</u>
- <u>Identigita ebla klientaro -> prognozu la mendadon.</u>

En la rektangula kadro aperu la titolo:
<u>5. INVENTARO (LISTO) DE LA NECESAJ RIMEDOJ</u>
kaj la teksto:
- lokalo, materialo, tipo de dungitoj (plie: tiknika konsilumo, daŭra formado...) -> Kiom la laborontoj ?
Pri ĉiu rimedo ekzistas respektenda leĝaro.

En la tabelo estu en la supra linio la vortoj
fortoj / malfortoj / konitaĵoj / nekonitaĵoj
kaj en la unua kolumno la vortoj
ejo, lokalo / materialo / provizistoj / perantoj / homaj rimedoj
(la unua rektanguleto de la tabelo restu malplena)

## Komercaj petoj kaj proponoj

### Albanio

Bonkvalitaj sonorilegoj por preĝejoj produktataj per nuntempa teknologio. Diversaj grandecoj kaj laŭmende; ekz. 35 kg --> 700 USD, 60 kg --> 1000 USD, 100 kg --> 1300 USD. Mendu ĉe "KARAJANI SHPK" (IKEF 176), RR Abdi TOPTANI Nr 2, TIRANE, fakso +355 42 23972.

### Rusio

Tomsk estas malnova scienca kaj kleriga centro, sed ekde 1991 iĝis iom izolita. Ĝi disponas pri multaj valoraj produktoj kaj samtempe urĝe bezonas partnerojn por konstruado, lignoprilaborado, ekologia purigado ktp. Celataj estas longedaŭraj ekonomiaj ligoj. Tomska Foiro regule organizas diverstemaj ekspozicioj. Kiuj sukcesas varbi partoprenanton por tia ekspozicio, ricevos maklaraĵon. Informoj: fakso 7-3822-419768. Pli detalaj informoj troviĝas en revuo "Aktuale Eŭro-Azia" (vidu aliloke en ĉi tiu revuo).

### Serbio

Persono kun ekonomia kaj jura sperto, diplomita Esperanto-pedagogo, serĉas iun ajn laboron en Eŭropa Unio, laŭ ŝtatleĝo kaj kristana moralo. S-ro Joĉjo ĜURIĈ, Pf. 5, YU-11 307 BOLEČ.

### Tanzanio

Serĉas kontaktojn kun komercistoj kaj investantoj ĉirkaŭ la mondo kiuj interesiĝas pri komerco kaj investo en Tanzanio. Korespondo en angla kaj Esperanto. Bonvolu aldoni 2 IRK al respondo. S-ro Silivester N. Nyinyimbe, P.O. Box 147, Bunda, Tanzanio.

## Ekologia kontrolo (angle: "audit")

Laŭ germana gazeto Frankfurter Allgemeine Zeitung (3 junio 1996) la Komisiono de la Eŭropa Unio pasintjare publikigis regularon por ekologia kontrolo de entreprenoj. Ŝajne entrepreno kiu sukcese trapasis tian kontrolon, ricevas "kvalitmarkon". Ĉu iu leganto havas pli da informoj pri tio ?

RR



## Kurso por junaj internaciaj entreprenistoj

EKA - Esperanto Komerca Agado - daŭrigas en sia projekto por praktika utiligo de la internacia lingvo ĉe komercaj rilatoj. Sekve de seminarioj en Poprad (Slovakio), Pécs (Hungario) kaj Pineto (dum la pasinta itala kongreso), ene de EKA startos ĉijare kurso por junaj internaciaj entreprenistoj. La kurso donos instruadon pri Esperanto kaj krome - kunlabore kun lokaj institucioj - bazan trejnadon pri internacia komerco-tekniko dum 3 staĝoj de po 4 lecionoj. La dua staĝo okazos eksterlande pro lingva instruado fare de fremda instruisto kaj planata renkontiĝo kun lokaj entreprenistoj. La kuso finiĝos per unuagrada ekzameno kun komerco-faka atesto.

Ĉefa punkto de tiu ĉi plano estas starigo de reciproke similaj samcelaj kursoj fare de eksterlandaj esperantistaj institucioj, kunlabore kun lokaj organizoj, aparte en landoj de centra kaj orienta Eŭropo, por estigi la ebligon de eksterlanda staĝo kaj la atingon de efikaj sinergiaj rezultoj.

La kurso mem tute ne celas profiton, ĉar intencas nur favori internaciajn komercajn rilatojn, aparte de la mezaj kaj malgrandaj entreprenoj aŭ de tute novaj entreprenistoj.

Por havi sinergiajn rezultojn, necesas estigi tute similajn kursojn fare de partneraj asocioj. Interesitaj partneroj kontaktu: EKA, ĉe Triesta E-Asocio, via Crispi 43, I-34125 TRIESTE, telefono/fakso +39 40 763128, reto aviotto(a)spin.it.

### revuo AKTUALE eŭro-azia (AEA)

estas eldonita en Rusia urbo Tomsk kaj havas diversan enhavon: lokaj kaj internaciaj E-novaĵoj, humuro, poezio, intervjuoj kaj komercaj informoj pri la regiono. 8 A4-paĝoj, aperas 8-foje jare kun suplementoj. Abono: sendu 6 USD aŭ 10 DEM al ĉefredaktoro Vladimir MININ, a.ja. 2000, TOMSK, RU-634063, Rusio. Ankaŭ eblas pagi en USD tra Western Union aŭ kompensi per liverado de varoj aŭ servoj.

**Identecŝildaro 1996-1997**

Sube troviĝas formularo por la nova identecŝildaro. Jen la instrukcioj:

* Se vi deziras ke aperu kompletaj informoj pri vi kaj pri viakomerco, plenigu la formularon kaj sendu ĝin (per poŝto, retpoŝto aŭ fakso) al Roland Rotsaert. Foto via bonvenas, sed pripense ke ne eblos perfekte fotokopii ĝin.
* Se vi deziras tute ne aperi en la identecŝildaro, informu Roland Rotsaert pri tio.
* Se sufiĉas mencio de via nomo kaj adreso en la IKEF-adresaro, faru nenion: tio estas la "aŭtomata" proceduro.

Bonvolu kontroli viajn nomon kaj adreson sur la adresetikedo kaj komuniki erarojn. La ĉefa nomparto estu en majuskloj.

Se la respondoj alvenas sufiĉe rapide, la identecŝildaro jam estos preta por la UK en Prago. Se ne, la membroj ricevos ĝin kun LM 54.

RR

-----------------------------------------------------------

Informoj por identecŝildaro 1996-97 (resendota al R. Rotsaert)

Nomo: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Membronumero:

Lingvaj kapabloj: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Naskiĝjaro:

Nomo de la firmao: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Privata adreso: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Profesia adreso: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Telekomunikado: (telefono, fakso, retpoŝto - hejme, oficeje)

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Priskribo de la komerca aktiveco, proponoj, deziroj... (maksimume 5 linioj):

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .



. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .